# JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2018–2019


## 1. Konsciigo (Informado)

1.1. Gazetara komunikado
1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
1.3. *Esperanto-Aktiv'*
1.4 Foiroj

## 2. Kapabligo

2.1. Kulturcentroj
2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)
2.3. Interretaj kursoj
2.4. KER-Ekzamenoj
2.5. "Bac blanc d'espéranto"
2.6. Afrika solidareco
2.7. Ĝemelaj urboj

## 3. Komunumo

3.1. Butiko
3.2. Sidejo
3.3. Landa kongreso
3.4. Preleg-turneoj

## 4. Kunordigado kaj funkciado

4.1. Rilatoj kun UEA
4.2. Rilatoj kun SAT-Amikaro
4.3. Komitato kaj membraro
4.4. Financo

## 5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

## 6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

# Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Espéranto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta en Parizo la 13an de junio posttagmeze, aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org.

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la *Jara Raporto*: Aleks André, Susanna Beglaryan, Katja Boen, Florian Cezard, Guy Camy, Xavier Godivier, Didier Janot, Maurice Juy, Edmond Ludwig, Vinko Markovo, Yves Nicolas, Claude Nourmont, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau, Bert Schumann, Gilles Tabard, Pascal Vilain.

Agrablan legadon deziras al vi,

la estraro de Espéranto-France.

---

# 1. Konsciigo (Informado)


1.1. Gazetara komunikado
1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
1.3. Esperanto-Aktiv'
1.4 Foiroj


## 1.1. Gazetara Komunikado

* Gazetara Komuniko estis sendita la 26an julio 2019 okaze de la Eo-Tago
esperanto-france.org/communiques-de-presse-2019
* multaj artikoloj aperis en la franca gazetaro: esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2019

## 1.2. Le Monde de l'Espéranto

Ĉefredaktoro : Claude Nourmont. Grafika laboro : Emmanuelle Richard

- Bruno Flochon ĉesis enpaĝigi LME. Sekvis provo pri enpaĝigo fare de ekstera homo, ne-esperantisto, sed estis diversaj problemoj, kaj nun enpaĝigas la revuon Emmanuelle Richard.
- Regule kunlaboras al la aktualaĵoj en la franca aŭ/kaj al la kulturaj paĝoj: Bernard Behra, R. Coquisart, Mireille Grosjean, Hori Jasuo, Anne Jausions, D. Loison, Edmond Ludwig, Flo Martorell, Yves Nicolas, G. Tabard, R. Triolle, la partoprenantoj de diversaj gravaj staĝoj k.a., kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.
- La franclingvajn tekstojn kontrollegas Yannick kaj Janine Dumoulin. La esperantlingvajn tekstojn kontrollegas Brian Moon.
- En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, laŭeble dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto

originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.

- Aperis kvar numeroj en la lasta periodo; entute oni raportis pri okazaĵoj en dudeko da landoj de ĉiuj kontinentoj
    - Numero 601: dosiero *2018 année de la culture espérantophone Spécial Marjorie Boulton*;
    - Numero 602: dosiero *La création littéraire en espéranto à l'heure actuelle*;
    - Numero 603: dosiero *Espéranto et culture: Baldur Ragnarsson*;
    - Numero 604 : *2019 : Année Internationale des langues autochtones*.
- Danke al laboro de Claude Bensimon, *Le Monde de l'Espéranto* estas nun enretigata en la retejon de Espéranto-France: esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperanto

*Raportas Claude Nourmont*

## 1.3. Esperanto-Aktiv'

La reta informletero *Esperanto-Aktiv'*, verkita en la franca lingvo, aperas ĉiumonate. UFE kaj JEFO kune dissendas ĝin, de pli ol 6 jaroj, al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO).

- Pli ol 4000 personoj ricevas la leteron retmesaĝe, ĉirkaŭ 50 personoj ricevas ĝin perpoŝte.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn tie : esperanto-france.org/esperanto-aktiv kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni laŭ la sama retejo.
- Bonvolu sendi viajn ideojn, sugestojn, artikolojn, anoncojn pri eventoj al: esperanto-aktiv@esperanto-france.org.

### Kvar rubrikoj

- **Découvertes** (Malkovroj) prezentas temojn rilate al la esperanta movado, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de diversaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.
- **Ils l'ont fait... dans leur région** (*Okazis*) listigas la ĵusajn agadojn de la lokaj kluboj; tiun rubrikon prizorgas Jeanne-Marie Cash.
  → Post ĉiu evento, bonvolu sendi fotojn kaj artikoleton priskribante la okazaĵojn, la etoson, vian sperton.
- **Calendrier** (Okazos) vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio, en Eŭropo kaj ankaŭ tra la cetero de la mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgis Dominique Lacambre.
- **Lu, vu, écouté ce mois-ci** (Leginda, spektinda, aŭskultinda) prezentas recenzon de ĉu libro, ĉu muzikalbumo, ĉu filmo, freŝe publikigita aŭ pli malnova; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.

### Redaktora teamo

Jeanne-Marie Cash (redaktoro de rubriko *Ils l'ont fait...*; enpaĝigo de la PDF), Raymonde Coquisart (preparo kaj dissendo de la papera versio), Aleks Kadar, Dominique Lacambre (kalendaro), Claude Nourmont, Emmanuelle Richard (teknika spertulo; reteja mastrumado; reta dissendo), Axel Rousseau.

### Listo de artikoloj

| Monato | N-ro | Malkovroj | Leginda, spektinda, aŭskultinda |
|---|---|---|---|
| 01 / 2019 | EA 97 | Traducteur de prix Goncourt | *Grammaire ABD d'espéranto*, de Ch. De Vleminck et É. Van Damme |
| 02 / 2019 | EA 98 | Applications mobiles pour l'espéranto | *La aventuroj de Pinokjo*, de Carlo Collodi |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 03 / 2019 | EA 99 | Le projet Ĝemelaj Urboj | *Adelfjo Musdetektivo*, de Claudia Maria Behling |
| 04 / 2019 | EA 100 | Élections européennes et espéranto | *La domination de l'anglais, un défi pour l'Europe,* de Robert Phillipson |
| 05 / 2019 | EA 101 | Quelques blogs à lire en espéranto | *Ne ekzistas verdaj steloj (60 mikronoveloj kun suplemento)* de Liven Dek |
| 06 / 2019 | EA 102 | Paralela Universo (Univers Parallèle) | *La Monto*, d'István Nemere |
| 07 / 2019 | EA 103 | L'espéranto en Belgique. | *Sen novaĵo pri Gurb*, de E. Mendoza |
| 09 /2019 | EA 104 | L'espéranto en Suisse. | *L'espéranto, c'est dans la poche !* |
| 10 / 2019 | EA 105 | L'espéranto au Québec | *Vivo de Zamenhof*, d'Edmond Privat |
| 11 / 2019 | EA 106 | Présentation du mouvement « Espéranto pour l'Europe » | *Nenifar'*, de Gijom' Armide |
| 12/2019 | EA 107 | D'autres projets de langues construites | *Kvazaŭ ĉio dependus de mi*, de T. Steele |

*Raportas Emmanuelle Richard*

## 1.4. Foiroj

En novembro 2018, Espéranto-France kaj Espéranto-Jeunes havis budon por prezenti Esperanton al vizitantoj, kiuj estas ĉefe mezlernejanoj el klasoj $4^{e}$, $3^{e}$, $2^{nde}$, $1^{ère}$, kaj ankaŭ profesiuloj pri Edukado. Ĉirkaŭ 30 000 homoj preterpasis antaŭ nia budo, 7 000 ricevis reklamilon el kiuj ĉirkaŭ 20% ricevis pli kompletan informon pri Esperanto. Okaze de tiu evento multaj junuloj eksciis pri Esperanto, sciante ke en la ĝenerala publiko multaj junuloj neniam aŭdis pri Esperanto, kaj ankoraŭ pli ne scias ke ĝi estas lingvo. Kiel la antaŭaj jaroj, la frapfrazo de nia budo estis *Espéranto, langue du monde*.

En septembro 2019 (13-15), dekvino da esp-istoj deĵoris en la budo ĉe la **Fête de l'Huma**. 3500 kalendaroj estis disdonitaj ; libroj estis venditaj *Tinĉjo*, *La Eta Princo*, La domination de *l'anglais* (R. Phillipson). Esperanto-lulkanto (*Dek bovinoj* : youtu.be/gh9w7QpyQtY) estis uzita enkonduke al ekspresa ekkurso pri Eo. Effet garanti pour rompre la glace ! Kontakto kun Bernard Thibault, eksa prezidanto de la sindikato CGT nun laboranta en la Internacia Labor-Organizaĵo (OIT). Homoj aliĝis al la nova tipo de kurso organizata de Guillaume *Vera-Navas Café, Croissant et Espéranto* kiel « Meetup » en Parizo. Trideko da homoj lasis siajn kontaktinformojn por ricevi informleteron kaj informojn. Ni estis unu el nuraj (la ununura ?) budoj, kiuj akceptis la « pêche » (loka civitana monunuo en la pariza regiono).




*Raportas Didier Janot,* Jean-Lucien Mazeau

# 2. Kapabligo

2.1. Kulturcentroj
2.1.1. Greziljono - Kulturdomo de Esperanto (MCE Grésillon)
2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)
2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)
2.3. Interretaj kursoj
2.4. KER-Ekzamenoj
2.5. “Bac Blanc d’espéranto”
2.6. Afrika solidareco
2.7. Ĝemelaj urboj

## 2.1. Kulturcentroj

### 2.1.1. Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France estis komitatano de Greziljono inter 2010 kaj 2018 kaj rekandidatiĝas en 2020
Reprezentanto de Esperanto-France: Didier Loison.

#### *Propraj staĝoj*

Entute : 44 tagoj, 1656 tranoktoj, 4516 preparitaj manĝoj, por 275 homoj el kiuj 30 infanoj.

- ĥoro Interkant kaj LandArto je 12-16/04 kun 26 personoj
- PRINTEMPaS kaj migrada semajnfino je 26/04-04/05 kun 40 personoj
- Someraj staĝoj dum 20 tagoj en julio kaj aŭgusto kun entute 115 personoj
- Aŭtune kun Interkant je 26/10-03/11 kun 71 personoj
- Jarfina festo kaj novjara festeno je 28/12-01/01 kun 23 personoj

Laboroj kun 23 volontuloj okazis dum 73 tagoj

- Ekinstalado de dormĉambro por rulseĝulo en la liva kromdomo
- Firmao renovigis la tutan tegmenton de la dekstra kromdomo

#### *Aliaj okazaĵoj*

- Luado al ne-esp-istaj grupoj por financi laborojn: 25 luoj dum entute 85 noktoj. E-istaj luantoj ĝuas rabaton! Inter alie luis tutsemajne angla kaj francilia ĥoroj, luis semajnfine nudula klubo kaj 2 teatraj asocioj.
- La urbo Baugé organizis publikan spektaklon: teatraĵon sur libana cedro en la kastela korto
- La asocio Kampo de la Griloj helpas la kulturdomon kaj rilatas kun la loka franclingva publiko
- Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj amika etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongreson aŭ staĝojn.

*Raportas Bert Schumann*

### 2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)

Agadraporto por la jaro 2019

*Staĝoj*

- Februaro: lingva staĝo por progresintoj, gvidita de Andrea Bertrand, paralele staĝo prepare al la triagrada ekzameno, gvidita de Brian Moon.
- Majo: la nun tradicia staĝo pri altnivela tradukado, sub gvido de Brian Moon, vic-prezidanto de la Akademio.
- Junio: promenadoj tra naturo kaj Vikipedio, gviditaj de Alain Favre (fungologo, botanikisto); multaj vikipediaj artikoloj estis kreitaj, pluraj dekoj estis plibonigitaj.
- Oktobro: Katalin Kováts gvidis pedagogian staĝon: *Ekzercoj - kreado kaj solvado*.

- Daŭre organizas la bibliotekon de la kulturcentro Philippe Cousson. Grande progresis la katalogigo.
- Li ankaŭ zorgas pri farigo de laboroj por ke la centro estu en bonaj materiaj kondiĉoj (tegmentoj, humideco, farbado, ktp). Zorgas pri la ĝardeno Bernard Lagrange.
- Prizorgas la retpaĝojn de Kvinpetalo Yannick Dumoulin.
- Bonaj kontaktoj en la vilaĝo per sistema informado ĉe la lokaj komercistoj (i.a. dank' al la kalendaretoj); eta fako pri Esperanto en la mediateko (kun regula ricevo de *Le Monde de l'Espéranto*).
- Kvinpetalo helpas konigi Bouresse tra la tuta mondo. La kulturcentro havis budon en la Movada Foiro en Lahti, kaj en diversaj okazoj oni mencias pri Kvinpetalo en esperantaj revuoj.

*Raportas Claude Nourmont*

## 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

FEI estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio. Ĝi pretas helpi ne nur en okazigo de ekzamenoj, sed ankaŭ en lingva kontrolo de eo-tekstoj verkitaj de franclingvanoj, aŭ tradukitaj el la franca. Ĝia jarkunsido okazis dimanĉon la 13an de oktobro 2019 en la sidejo de Espéranto-France, unuafoje kun partopreno defore per komputila telefono kaj tujmesaĝado de du anoj.

### FEI-ekzamenoj

En 2019, ekzamen-sesioj okazis nur en Le Beausset (Provenco) kaj en Lille. Sukcesis : la unuagradan, 3 kandidatoj ; la duagradan, 2 kandidatoj. Sesio por la komuna parto de la triagrada ekzameno okazis en Parizo en januaro 2020, kun tri kandidatoj.
La studendaj verkoj por la *Atesto pri Supera Lernado* (komuna parto de la triagrada ekzameno, trapasenda antaŭ la fakaj branĉoj), ŝanĝiĝis kaj nun konsistas el : *Ne ekzistas verdaj steloj*, de Liven Dek; *Viktimoj*, de Julio Baghy; *La Zamenhof-strato*, de Roman Dobrzyński; *La bona lingvo*, de Claude Piron.

### Estraro

Mandatperiodo 2019-2022

Prezidanto : Vinko Markovo ; Vic-prezidanto: Maksimiliano Gverino ; Kasisto : Michel Dechy ; Vic-sekretario : Didier Janot. Respondeculo pri la retejo : Pierre Dieumegard

Ekzamena komisiono : Renée Triolle (direktoro), Elisabeth Barbay, Jesper Jacobsen, Anne-Sophie Markov.

Ceteraj membroj : Christian Lavarenne, François Lo Jacomo, Jean-Claude Roy, Pascal Vilain

Venontaj planitaj trejn- aŭ ekzamen-sesioj

Studado de la verkoj proponitaj por la triagrada ekzameno en Kvinpetalo dum februaro 2020.

Unuagrada ekzameno en pariza regiono en junio 2020.

Retejo: franca-esperanto-instituto.net

Por pliaj informoj, interalie venontaj ekzamensesioj kaj taskoj por memtrejniĝo.

*Raportas Vinko Markovo*

## 2.3. Interretaj kursoj

Espéranto-France mastrumas 3 interretajn kursojn: la programo *Kurso de Esperanto*, la *Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons* kaj *Gerda Malaperis* por progresantoj.

45 volontuloj korektas (54 en 2016-2017) korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2018 ĝis septembro 2019, 1511 lernantoj aliĝis (683 en 2016-2017) kaj 303 finlernis la elektitan kurson (139 en 2016-2017). Dum tiu periodo, la kurso multe ŝanĝiĝis :

- Ni aldonis informojn por instigi la lernantojn daŭrigi sian lernadon : ikurso.esperanto-france.org/helpo.php?section=kajposte
- Ni aldonis sistemon kiu sendas regule al la lernantoj diversajn informojn pri la kulturo de esperanto (ZEO, denaskuloj, kongresoj ktp.)
- Ni aldonis sistemon por ke la korektantoj korektu la lecionojn rekte sur la retejo (pro diversaj retmesaĝ-problemoj)
- Ni ankoraŭ korektis diversajn cimojn kaj tajperarojn.

*Raportas Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau*

## 2.4. KER-ekzamenoj

En 2019 okazis KER-ekzamenoj en Greziljono (majo 2019), kaj en Parizo kaj Fleury-les-Aubrais (okaze de la tutmonda ekzamen-tago en junio 2019). Ĝenerale ekde kelkaj jaroj, en Francio mankas agadoj por varbi kandidatojn (do fakte novajn Esperanto-lernantojn/progresantojn) kaj funkciigi ekzamen-centrojn interalie okaze de la internacia ekzamen-tago (edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj).

*Raportas Didier Janot*

## 2.5. Komisiono Espéranto au bac

Agadraporto de la Komisiono **Espéranto au bac**: lernojaro 2018-2019

Sekve de la kuraĝigaj jam atingitaj rezultoj (renkontiĝoj en la ministrejo pri edukado ; ebleco eksperimenti instruadon de Esperanto en lernejoj ; interesaj rezultoj de la unuaj du eksperimento-jaroj ; esperplena renkontiĝo kun la FCPE), la komisiono plustrebis ampleksigi tiujn atingaĵojn. Mallongige, jen kio indas scii. Ni :

- aperigis "alvokojn" al nia instruistaro franca, por pli da envolviĝo en tiu gravega eksperimento. Sen notinda rezulto (!);
- ofertis senpagan abonigon por la "eksperimentejoj" al nia revuo LME;
- renkontiĝis kun la PEEP: fine de la kunsido, la prezidanto promesis helpi nian agadon dum "baldaŭa kunveno" kun la ministro JM Blanquer. Bedaŭrinde, tio ne okazis pro… "manko da tempo" (!);
- rememorigis al la FCPE ke ili kontaktu ĉiujn siajn lokajn asociojn, kiel proponite dum nia pasinta kunsido. Finfine, venis nova propono: traduki esperanten ilia "Internacia alvoko". Kompreneble, tion ni faris sed… tio ankoraŭ ne aperis!

- plurfoje petis novan rendevuon al tiuj nekredindaj du federacioj; ĝis nun, sensukcese (!);
- aliflanke,kien enkondukiĝis Esperanto, petis al la lernejestroj iliajn komentojn rilate tian eksperimenton: neniun respondon ni ricevis(!);
- kunvenis telefone kun la CNED: interesa estis ankaŭ tiu komunikado kaj sekve, laŭ posta siadiro, la prezidanto petis al la DGESCO, ke ili nin ricevu.
- petis denove rendevuon al la DGESCO: ni plu paciencas!
- tiucele, preparis dosieron, kiun ni ĝisdatigas laŭ la informoj, kiujn ni elprenas el oficialaj raportoj, kies temo rilatas al fremdaj lingvoj.

Aldone, ni :

- malsukcesis okazigi Mondpacludojn ie en Francio.
- sukcesis ricevi la plian subtenon al nia movado de Robert Phillipson.

Konklude kaj kiel dirite pasintjare, evidentiĝas ke longa vojo ankoraŭ kuŝas interne kaj eksterne de nia movado. Ni plu antaŭeniros nian plej bonon por atingi nian celon : “Esperanto au bac!”

*Raportas Aleks André, Guy Camy kaj Maurice Juy*

## 2.6. Afrika Solidareco

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de Afrika Solidareco.

## 2.7. Ĝemelaj urboj

Mi laboris pri kontaktoj kun Romo, la sola ĝemela urbo de Parizo kaj kun Berlino, unu el la kvindekaj partneraj urboj de Parizo. Kontaktitaj estis Montrealo kaj Seùlo, sed ne venis respondoj. Pri la paĝo Fejsbuko kreita de Mireille Grosjean (Svislando), mi zorgas parte post transdono de rolo al mi farita de Mireille. Mi ofte aperigas mesaĝojn kaj fotojn cele vivigi la paĝon (novembre estis 122 ŝatantoj, nun 162. Mi zorgas foje pri rubriko de UEA forumo. Pri la temo Ĝemelaj Urboj okazis telefona kunsido oktobre kun la ĝenerala sekretario de UEA. Mi preparis novajn artikolojn france kaj esperante por la retejo Esperanto France. La plej urĝa plano estas funkciigi la komisionon pri ĝemelaj urboj kadre de Esperanto France.

*Raportas Raymonde Coquisart*

# 3. Komunumo

3.1. Butiko
3.2. Sidejo
3.3. Landa kongreso
3.4. Preleg-turneoj

## 3.1. Butiko

Plej bonaj vendoj dum la jaro 2019.

| | | |
|---|---|---|
| *Eta Princo* | 570 | 3666,80€ |
| *Metodo 11* (pour commencer) ed. 2018 | 291 | 2237,85€ |
| *Grand dictionnaire Espéranto-français* | 75 | 747,50€ |
| *Grand dictionnaire français-espéranto* (avec supplément) | 73 | 708,50€ |
| *La Templo de l' Suno* | 47 | 547,50€ |
| *Dictionnaire pratique* | 24 | 372,80€ |
| *La domination de l'anglais, un défi pour l'Europe* | 13 | 283,60€ |
| *L'espéranto, c'est dans la poche !* | 350 | 222,50€ |
| *Cours rationnel d'espéranto* (éd. 2006) | 22 | 211,00€ |
| *Gerda malaperis!* | 34 | 200,10€ |
| *Panneau déroulant de stand (roll up)* | 4 | 200,00€ |
| La maljunulino, kiu paŝis en la maro | 12 | 199,60€ |
| Espéranto par la méthode directe | 21 | 150,47€ |
| *Dépliant "Espéranto la langue équitable" (frais d'envoi)* | 2101 | 147,07€ |
| *Hobito aŭ tien kaj reen* | 7 | 138,60€ |
| *Kredu min sinjotino!* | 12 | 136,80€ |
| *Drapeau Espéranto la langue équitable* | 13 | 136,00€ |

*Raportas Emmanuelle Richard*

## 3.2. Sidejo

La Sidejo de Esperanto France elkore dankas vin pro via atento kaj subteno dum la tuta jaro 2019.

Sekve de ricevo kaj traktado de nenombreblaj telefonalvokoj, retmesaĝoj same kiel poŝtleteroj adresitaj al la sidejo ni :

- preparis kaj sendis pli ol 600 mendojn al niaj membroj kaj aktivuloj;
- notis pli ol 850 aliĝojn al Espéranto France kaj abonojn al LME;
- notis pli ol 300 aliĝojn al UEA kaj al UK 2019;
- same kiel pli ol 180 abonojn al internaciaj revuoj.

Ni prizorgis ankaŭ pri specifajn agadojn kaj projektojn :

- kunorganizado kun la Brita Esperanto Asocio de Kongreso 2019 en Dovro;
- daurigo de projekto "Afrika Agado" – sendo de libroj en Afriko;
- akcepto de pluraj konferencoj, kunvenoj, renkontiĝo;
- daŭrigo de laboro por ordigi kaj numerigi nian arkivan trezoron, respondecas Régis Fournier kaj Jean Lazert, arkivo.esperanto-france.org/

La sidejo estas malfermita lunde, marde, merkrede je la 9a ĝis la 18a horo (post la 18a horo preskaŭ ĉiutage okazas kursoj). Ĵaŭdo estas rezervita por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas ankaŭ antaŭvidintajn au pasantajn vizitantojn.

Kiel kutime pluraj eksterlandanoj vizitis la sidejon en 2019 (el Brazilio, Usono, Hispanio, Ĉinio, Russio, Belgio)
Vi estas bonvenaj dum viaj voĵaĝoj en Parizo kaj tra Parizo, nia skipo (Liliane Bon, Maria Fessl, Jean-Louis Poullet, Susanna Beglaryan) plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn...

*Raportas Susanna Beglaryan, kunordiganto de la sidejo*

## 3.3. La landa kongreso

Komuna landa kongreso kun Esperanto-Asocio de Britio (EAB) okazis en Dovro (12-15 aprilo 2019).

## 3.4. Preleg-turneoj

Dennis Keefe (usonano) prelegvojaĝis de la 4a de novembro ĝis la 8a de decembro 2018. Li vizitis 15 klubojn. Alan Neven Kovacic (kroato) turneis de la 15a de januaro 2019 ĝis la 17a de februaro, li vizitis 18 klubojn. La familio Handzlik (el Pollando. Georgo, Vinjo kaj Dominika) prelegvojaĝis de la 5a ĝis la 22a de majo kaj vizitis 9 klubojn. Entute 29 kluboj estis vizititaj:

- 19 kluboj akceptis unu preleganton : Amiens, Angers, Antwerpen, Avranches, Brive, Bruselo, Epinal, Grenoble, Hérouville-St-Clair, La Ciotat, Le Mans, Liège (Tilff), Lyon, Périgueux, Romans, Saint-Malo, Saint-Nazaire, Vannes, Vendée.
- La Normanda asocio akceptis la familion Handzlik dum sia ĝenerala asembleo.
- 8 kluboj akceptis du prelegantojn: Béziers, Bourg-en-Bresse, Châteauroux, Limoges, Paris, Thionville, Toulouse, Tours.
- 2 kluboj akceptis la tri prelegantojn: Bourges kaj Lille.

<u>Malfacilaĵoj</u>

- Pluraj kluboj "perdis" la kutimon sendi sian raporton. Pro tio, estis malfacile kalkuli kiom da homoj ĉeestis la lokajn aranĝojn (mi dirus pli-malpli 200 homoj po unu turneo). Konsekvence, la sintezaj raportoj, ne kompletaj kaj malfrue senditaj, estis malpli interesaj.
- Mi devis rekontakti plurajn klubojn, ke ili sendu siajn veturelspezojn por kalkuli la mezan veturelspezon kaj por organizi la repagojn.
- Mi devis peti de pluraj kluboj, ke ili repagu sian veturkontribuon.

Estus bone anonci tiujn turneojn en la retpaĝo de EF kaj ke la sintezaj raportoj ankaù estu tie legeblaj. Kiu respondecas pri tio ?

Malgraŭ tiuj malfacilaĵoj, la plej multaj kluboj opinias tiujn turneojn interesaj por stimuli la lokan agadon kaj la enkluban vivon. Plej multaj organizis publikajn kunvenojn kies publiko estis tre majoritate esperantista. Pluraj kluboj intervenigis la prelegantojn en lernejoj diversgradaj. La lokaj gazetoj bedaùrinde malofte raportis pri tiuj eventoj.

*Raportas Yves Nicolas*

# 4. Kunordigado kaj funkciado

4.1. Rilato kun UEA
4.2. Komitato kaj membraro
4.3. Financo

## 4.1. Rilato kun UEA

Ĉefdelegito de UEA por Francio : Renée Triolle.

Espéranto-France havas regulajn kontaktojn kun UEA. La sidejo zorgas pri perado de kotizoj kaj aliaj servoj.

Reprezentanto de EF ĉe la komitato de UEA, Claude Nourmont:

- Partoprenis la komitatajn kunsidojn de UEA dum la Universala Kongreso en Lahti;
- Partoprenas en la diskutlisto komitato de UEA regule tra la jaro;
- Raportas al UEA pri okazaĵoj en EF;
- Reciproke informas la membrojn de EF pri gravaĵoj ĉe UEA.

*Raportas Claude Nourmont*

## 4.2. Komitato kaj membraro

Elektita en Du-Pontoj (Zweibrücken) (aprile 2018), la Komitato kunvenis kvar fojojn: majon 2018, oktobron 2018, januaron 2019, majon 2019.

**Reprezentas la membrojn (2018-2019):**

- Alexandre André
- Claude Bensimon
- Raymonde Coquisart
- Xavier Godivier
- Julia Hédoux
- Didier Janot
- Maurice Juy
- Aleks Kadar
- Didier Loison
- Sébastien Montagne
- Claude Nourmont
- Emmanuelle Richard
- Axel Rousseau
- Gilles Tabard

**Estraro (2018-2019):**

- Prezidanto: Axel Rousseau
- Vicprezidanto: Didier Loison
- Ĝenerala sekretario: Emmanuelle Richard
- Kasisto: Sébastien Montagne
- Estrarano: Raymonde Coquisart

**Reprezentantoj de la membraj asocioj (2018-2019):**

- Aŭvernio: Jean-Pierre Boulet
- Bretonio: Josette Ducloyer
- Langvedoko-Rusiljono: Florian Cézard
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: Gilbert Stambach
- Parizo-Francilio: Marianne Pierquin
- Poitou-Charentes: Marie-France Condé-Rey
- Provenco: Pascal Vilain
- Rodanalpoj: Michael Leibmann
- JEFO (junuloj): Lucas Teyssier
- FET (laboristoj): Flora Markov
- FKEA (katolikoj): Michèle-Abada Simon
- GEE (instruistoj/antoj): Jérôme Caré

La komitato estis parte renovigita en aprilo 2019, en Dovro.

**Reprezentas la membrojn (2019-2020):**

- Alexandre André
- Claude Bensimon
- Raymonde Coquisart
- Bernard Cornevin
- Xavier Godivier
- Julia Hédoux
- Jesper Jacobsen
- Maurice Juy
- Aleks Kadar
- Michael Leibmann
- Didier Loison
- Jean-Lucien Mazeau
- Sébastien Montagne
- Claude Nourmont
- Armand Salek
- Gilles Tabard

**Reprezentantoj de la membraj asocioj (2019-2020):**

- Aŭvernio: Jean-Pierre Boulet
- Bretonio: Josette Ducloyer
- Langvedoko-Rusiljono: Florian Cézard
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: Gilbert Stambach
- Parizo-Francilio: Marianne Pierquin
- Poitou-Charentes: MF Condé-Rey
- Provenco: Pascal Vilain
- Rodanalpoj: - -

**Estraro (2019-2020):**

- Prezidanto Didier Loison
- Vicprezidanto Maurice Juy
- Ĝenerala sekretario Gilles Tabard
- Vicsekretario Michael Leibmann
- Kasisto Sébastien Montagne
- Vickasisto Jean-Lucien Mazeau
- Estrarano Raymonde Coquisart

- JEFO (junuloj): Lucas Teyssier
- FET (laboristoj): Flora Markov
- FKEA (katolikoj): Michèle-Abada Simon
- GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot

### *Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo*

Estis 672 membroj je la fino de la periodo 2018-2019 (30a de septembro 2019), kontraŭ 605 membroj je fino de 2017-2018 kaj 579 membroj je fino de 2016-2017). Vidu la suban tabelon / grafikon montrantan la evoluon de la membraro ekde 2013-2

| **Federacio** | **2018-2019** | **2017-2018** | **2016-2017** | **2015-2016** | **2014-2015** | **2013-2014** |
|---|---|---|---|---|---|---|
| (sen federacio) | 34 | 38 | 59 | 61 | 53 | 59 |
| Aquitaine | 19 | 66 | 52 | 54 | 66 | 73 |
| Auvergne | 60 | 12 | 11 | 11 | 16 | 14 |
| Bourgogne-Franche-Comté | 10 | 23 | 31 | 33 | 24 | 22 |
| Bretagne | 29 | 35 | 35 | 26 | 31 | 31 |
| Centre-Ouest | 26 | 50 | 44 | 47 | 49 | 46 |
| France-Est | 58 | 38 | 37 | 41 | 43 | 40 |
| Paris-Île-de-France | 47 | 129 | 118 | 140 | 144 | 129 |
| Languedoc-Roussillon | 12 | 26 | 25 | 24 | 31 | 36 |
| Midi-Pyrénées | 71 | 11 | 12 | 9 | 13 | 13 |
| Nord | 137 | 45 | 32 | 27 | 36 | 30 |
| Normandie | 28 | 22 | 21 | 22 | 22 | 21 |
| Poitou-Charente | 6 | 7 | 6 | 7 | 12 | 9 |
| Provence | 40 | 37 | 38 | 44 | 44 | 37 |
| Rhône-Alpes | 95 | 65 | 66 | 71 | 82 | 80 |
| | **672** | **605** | **579** | **617** | **666** | **640** |

## 4.3. Financo

Vd. la ĉi kunan financan raporton.

# 5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

## 5.1. Akvitanio

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

## 5.2. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

## 5.3. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

### Lokaj grupoj

- **Côtes-d’Armor**: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Lannion, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay), Plouézec.
- **Finistère** :Douarnenez, Landerneau, Querrien.
- **Ille-et-Vilaine** : Rennes, Montfort, Saint-Malo.
- **Morbihan** : Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- **Loire-Atlantique** : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

**Membraro**: 154 membroj ĉi jare do 1 malpli ol dum la antaŭa jaro.

### Agoj de la federacio

- **Eldono de la federacia bulteno** *Verda Triskelo* (20-paĝa, 2 foje jare aŭtune kaj printempe), kun artikoloj proponitaj de la membroj de la diversaj lokaj kluboj, redaktoro: Jannick Huet.
- **Retejo**: bretonio.esperanto-france.org/ administrantoj: Bert Schumann kaj Xavier Godivier.
- **Reta diskutlisto de la membroj**: bretonio@yahoogroupes.fr kun 280 abonantoj, pli ol 200 mesaĝoj ene de 2019, administrata de kvar volontuloj.
- **Organizo de prelegturneoj**
  Du ĉefaj turneoj okazis dum 2019 en Bretonio, Ĉielismo el Ĉinio en marto kaj Rainer Kurz en majo :
  - **Ĉielismo, el Xi’an** (Ĉinio), invitita de la FEB, rondvojaĝis tra Bretonio de la 9ª de marto ĝis la 9ª de aprilo 2019. Li vizitis 15 klubojn kaj sukcese prelegis pri diversaj temoj.
    Pri sia sperto en uzo de Esperanto kiel komercisto li prelegis en la Komerca kaj Industria Ĉambro en Rennes kaj renkontis oficiston de tiu Ĉambro en St Brieuc. Pri ĉina historio kaj kulturo li prelegis en municipa biblioteko en St Malo, en Vannes, St Nazaire… Pri sia urbo Xi’an li prelegis en Pluezek, Lannion, Douarnenez… En kaj ĉirkaŭ Nantes, li prelegis pri la tri temoj, li estis invitita de Télé-Nantes kun Bruno kaj Maryvonne Robineau por intervjuo kaj eĉ partoprenis vinologian kunvenon.
    Li renkontis liceanojn en St Brieuc, partoprenis lingvan kafejon en Douarnenez, vizitis esperanto-klasojn, klubanojn, ĝuis turismajn lokojn kaj eĉ ekinoksan tajdon.
    Fine de sia turneo okazis en St Aignan-de-Grandlieu tagmanĝo kun impona grupo de esperantistoj el la tuta regiono, kiuj kantis, akompanataj de la gitaro de Luc, kaj aŭskultis ĉinajn kantojn bele

interpretitajn de Ĉielismo.
- **Rainer Kurz** rondvojaĝis tra Bretonio de la 12a ĝis la 25a de majo en Rennes, St Malo, Pleudaniel, Douarnenez, Couëron kiel detale raportita en antaŭa Verda Triskelo VT47.
- **Rilatoj kun Esperanto-France**, Josette Ducloyer reprezentis la FEB-on ĉe UFE, du aliaj membroj de la federacio estas ankaŭ UFE-komitatanoj kiel reprezentantoj de membroj de UFE.
- **Jara kunveno en Loudéac la 24an de marto 2019**
  19 ĉeestantoj, 16 membroj + 14 prokuroj,
  Fine de la mateno, okazis Skype Kunveno kun Isabelle, Damien kaj Zsofia en Hungario. Isabelle, Damien kaj sia filino Auriane foriris el Bretonio bicikle kaj alvenis en Hungario kie ili restis dum la vintro. Posttagmeze la Ĉino Ĉielismo prelegis pri la ĉina kulturo.

- **Agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio** :
  - **Kursoj de Esperanto** : Kursoj kaj konversaciaj rondoj estas proponitaj en 15 urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Detaloj pri ĉiuj kursoj estas ĉiu-jare disdonitaj en la aŭtuna revuo de la federacio, Verda triskelo, VT47 por ĉi-jare, konsultebla en la ttt-ejo de la FEB.
  - Pli detala raporto pri la lokaj asocioj estos prezentita okaze de la membrokunveno de la federacio kaj konsultebla en la TTT-ejo de la federacio.

*Raportas : Xavier Godivier*

## 5.4. Burgonjo-Franĉkonteo

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

## 5.5. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

Ne ekzistas vigla federacia asocio.

Ni proponas al vi ankaŭ legi la raporton pri la Kultura Esperanto-Centro Grésillon (vd. paragrafo 2.1.1).

## 5.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

Tiun jaron, la federacio ne kunsidis, ne plu vere vivas la asocio. Tamen, kelkaj eventoj kaj projektoj okazis.

### Regiona retejo

En 2018 kaj 2019, la federacio laboras kun la federacio de Midi-Pyrénées por editi novan retejon: www.occeo.net (mallongigo de occitanie esperanto). Tie, la lokaj kluboj povas krei propran kluban retejon, kaj la leganto trovos informon pri esperanta movanda tra la tuta granda regiono.

### Inter-regionaj kunvenoj

Du kunvenoj okazis inter la du federacioj (Languedoc-Roussillon kaj Midi-Pyrénées). Une dum la SEMEO (semajno de Eo organizita en Tuluzo), 3 personoj de la federacio de LR venis tutsabate por renkonti la MP federacion, paroli pri komuna projekton, ktp.

Poste, septembre, delegacio de Tuluzo alvenis en Montpellier pro daŭrigi la diskuton kaj plibonigi la interkonadon. Dum tiu kunveno, 2 gravaj projektoj naskiĝis: loka turneo de juna fremda esperantisto, kaj koncerto de Kjara Raggi, itala kantistino kiu verkas kaj kantas esperante.

### Zfa festo

Kiel kutime, okazis Zfa Festo finjare. Ĉiujare la gasto ŝanĝas: unufoje Montpellier, unufoje Béziers. Tiun jaron

estis vico de Montpellier, sed pro la trajna striko, nek Béziers nek la aliajn klubojn partoprenis la eventon. Ni tamen provis ĝoje festumi, kaj ni ĝuis belajn filmetojn pri orimagio, ridis pro ŝercojn kaj “bervalaĵojn” (maldecaj kontraŭknaloj), miris pro prelego kiu temis pri la planktaj strangaĵoj, kaj eĉ gastigi la plej junan esperontiston de la klubo (Clément, nur unu jaraĝa !).

*Raportas Florian Cezard*

## 5.7. Fédération Espéranto-Limousin

- Babilkunvenoj
- Forumoj de la asocioj en Limoĝo kaj en Brivo
- Plua eldono de nia trimonata bulteno Babilemo sen limoj (I. Jacob)
- Kreado de la nova retejo fare de Carole Landais kaj Gilles Tabard. Ni nepre devas helpi ilin kun artikoloj, esperantaj novaĵoj, diversaĵoj…
- 15-a de decembro : "Sankto-Zaza" en Limoĝo kun ĉirkaŭ 20 personoj, ĉe geBrunel kaj laboro pri la retejo de Esperanto-Limousin

### *En Brivo*

- Kurso en la Kultura centro : unufoje semajne ĝis junio + dufoje monate ekde septembro.
- Brigitte kaj Julien organizis kurson dum la somero kun nova lernanto, sed poste li foriris al Tours.
- Renkonto en liceo d'Arsonval kun lernejesto kaj dokumentistino en junio. Ili proponis ke ni prezentu esperanton al klasoj de “secondes” dum la tago de enirejo, sed sen sukceso.
- Organizado de budoj septembre en ekologia foiro kaj forumo de asocioj. (Pluraj kontaktoj sed neniu nova lernanto).

### *En Saint-Junien*

- Lingvaj Kafejoj en Saint-Junien kun la asocio Valo kaj en St-Auvent
- Ekde septembro : kurso kun 5 lernantoj kaj 2 instruistoj (C. Doucelin kaj I. Jacob)
- Januaro : Turneo de Alan Neven KOVACIC, kroata esperantisto, kiu parolis pri sia lando en Brivo la 24-an de januaro kaj en Limoĝo la 25-an.
- Majo : Turneo de la familio Handzlik kiu kantis en Limoĝo la 14-an
- Junio la 15an kaj la 16an : Botanika kaj esperanta staĝo en la Muelejo de Piot (Creuse) kun Marcelo Redoulez, Gilles Tabard, Karlo Frosto, Christian Lavarenne, Marie-Hélène Frogier kaj Isabelle Jacob
- Partopreno de kelkaj membroj :
    - Vojaĝo en landoj fare de Maria Merla, Pierre kaj Isabelle en eks-Jugoslavio kaj projekto de esperanta vojaĝo en Kroatio kaj en Bosnio-Hercegovino en junio 2021;
    - Partopreno en esperantaj ĥoroj de Lucia;
    - Partopreno de membroj en la UEA kongreso en Lahti (Finnlando), en la brita-franca kongreso en Dovero, en la SAT-Amikara kongreso en Montlucono, en la ILEI internacia kongreso en Ĉaĉak (Serbio).

*Raportas Isabelle Jacob*

## 5.8. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

**Jarraporto Septembro 2018 - Septembro 2019**

## Regiona kunordigado Membraro

La Federacio nombras entute 71 membrojn (kp. kun 96 membroj en 2017-2018), laŭ la nova interasocia kotizosistemo:

- Amieno: 16; Araso: 17; Bulonjo-ĉe-Maro: (mankas informo); Lillo: 13; Valencieno: 11 (6 personoj kiuj membriĝis pere de la interasocia kotizo kaj 5 kiuj kotizis nur al Valenciennes-Esperanto)
- individuoj-membroj: 14 Federaciaj kunsidoj, kongresoj:

La Federacia Komitato kunsidis unufoje en la periodo: la 15an de decembro en Lillo. Ankaŭ okazis federacia ĝenerala asembleo la 16an de decembro. Grava decido estas la ŝanĝo de nomo de la federacio: ĝi nun nomiĝas Fédération Espéranto Hauts-de-France (anstataŭ Fédération Espéranto-Nord). La federacio decidis aliĝi al la interasocia kotizsistemo.

## Rilatoj kun UFE

La prezidanto (Michel Dechy) reprezentas la Nordfrancian Federacion en la komitato de UFE.

## Informado kaj komunikado

### *Federacia gazeto, federacia retejo*

La Federacio eldonis retan informbultenon *Norda Kuriero*. Ĝi estis sendita papere al federacianoj, kiuj ne uzas Interreton. Ĝi aperis trifoje en la periodo: en novembro 2018, februaro 2019, junio 2019.

La dulingva federacia retejo viziteblas je la adreso: www.esperanto-nord.org

### *Informado en diversaj medioj*

Dum la Eŭropunia baloto Michel Dechy kaj Jean-Claude Roy multe agadis por la partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto, gluante grandan kvanton da afiŝoj... Aliaj federacianoj kiel Marc Anselmi agadis ene de partio kiel la francaj verduloj kiuj akceptis aldoni la vorton *Esperanto* en sian programon.

Michel Dechy prezentis Esperanton en diversaj bazlernejoj. Li prelegis pri *Humuro en la verkaro de Hergé* dum Mediteranea Esperanto Semajno, kaj ankau en Lyons Club kaj Rotary Club.

La diversaj kluboj partoprenis en diveraj foiroj kaj aranĝoj: asocia foiro (Villeneuve-d'Ascq), bildrakonta foiro (Lys-lez-Lannoy). La Lilla klubo starigis Esperanto-budon en la granda Lilla stratbazaro.

## Instruado kaj ekzamenoj

### *Kursoj kaj staĝoj*

Diversajn kursojn organizis la kluboj (lernjaro 2018-2019):

- Amieno: kurso por 2 komencantoj
- Araso: kurso por 12/13 komencantoj kaj progresantoj, komuna instruado
- Bersée: kurso por komencantoj kaj kaj progresantoj;
- Bulonjo-ĉe-Maro: babilrondo ĉiumerkrede;
- Lillo: 4 komencantoj kaj 3 progresantoj en MRES (Maison régionale de l'environnement et des solidarités); 5 lernantoj en la Lilla Universitato (Villeneuve-d'Ascq); 2 komencantoj en la Universitato pri Libera Tempo;
- Denain: kurso por 6 komencantoj.

### *Federaciaj ekzamensesioj*

La Federacio organizis ekzamensesion kun unu kandidato el Bersée.

## Kulturo kaj aranĝoj

En la urbo Salouël, apud Amieno, estis inaŭgurita nova Zeo: Allée de l'Espéranto (Aleo Esperanto). Ĉeestis urbestro, oficialuloj, kaj dudeko da esperantistoj (oktobro 2018).

La Amiena klubo instalis la ekspozicion *Esperanto dum la unua mondmilito* en la urbodomo en nov. 2018.

